# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 26/05/2022 Kvincentokdekkvara eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *esperanta retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 729,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas 300,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas 174,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas 154,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas 101,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde 2022 ?? ???)

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**
**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn.

Ĉu kapitulaco ne povas savi viajn vivojn, familiojn, domojn, urbojn, dignojn ktp *Roger Springer*



la esperanta retradio

Donas Bonan Cirkaŭ-5 Minutan Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon.



SILENTON, BONVOLU! 17A MAJO 2022

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917

**EKSTRAĴOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).**

**Numero 16 de "Por Progresantoj".**



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Kion diris Zamenhof en la libreto "Lingvaj Respondoj pri la logiko en la Esperanta gramatiko?

2). Kiuj estas la Esperantaj diftongoj?

3). Nomu la konjunkciojn en Esperanto parkere.

4). Kiom da plenaj propozicioj ekzistas en "Ni laboras kaj ni ankaŭ ludas."?

5). Kiu signifa diferenco ekzistas inter "Ni loĝas en la kamparo" kaj "Ni loĝas kampare." ?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 584 *Marcel Leereveld.*



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.

Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.

La 21a de majo estis la tria sabato Venis Roger Chris kaj malfrue Ian. *Roger Springer*

Ĉi tiu semajnfino estas tre grava en Manlio pro du aferoj.


La okazoj de la Nacia Voĉdonado kaj la naskiĝdato de Roĝero!

Multajn bondezirojn al vi Roĝero.

Ni esperas ke vi havos feliĉan tagon kun viaj familianoj *Chris Holliss*



# Feliĉan datrevenon de via naskiĝtago 2022-05-22



Kara Roger, Unu minuton post meznokto en Sidnejo ..... mi esperas ke mi estis la unua.

Jes, mi pensas pri vi, mi memoras kelkajn de niaj komunaj momentoj, kiel tiun kaj mi deziras al vi Feliĉan Datrevenon

Mi esperas ke "ili" festas vin serioze...... Insistu!

Kompreneble, mi devas refoje danki vin pro via nekredebla laboro rilate al Aŭstraliaj Esperantistoj.

Restu sana ... kaj daŭrigu! Plej amike, *Sandor Horvath*



Feliĉan 91-an kara Rogero! - multjara eldonisto de AE, sentima politika publicisto (malgraŭ miaj duboj kaj avertoj), senĉesa laboranto por Esperanto en Aŭstralio, kaj, precipe, mia ofta pertelefono- interkonversacianto/diskutanto/debatanto.

Miajn tre sincerajn dezirojn por multe pli da feliĉaj jaroj. *Vera Payne*



Saluton kara Roger H Springer
Edukado.net kaj Kajto kore salutas vin okaze de via naskiĝtaga datreveno.
Ni deziras al vi bonan sanon, feliĉon kaj multajn fruktodonajn kaj ĝojigajn renkontiĝojn kun aliaj membroj de nia komunumo.
Komence de ĉiu nova jaro aŭ vivperiodo oni taksas la pasintecon kaj vortumas novajn dezirojn kaj planojn. Kiuj estas viaj planoj por la estonteco rilate nian komunan lingvon Esperanto? Bv. sciigi tion al ni sube ĉe la komentoj.
Antaŭdankon kaj bonan festadon, kore, *Katalin Kovats*, redaktoro
Kaj nun vidu nian surprizon en la filmejo: https://www.youtube.com/watch?v=VxgJqULacIc

**3ZZZ**… En la elsendo de la 23a de majo troviĝas informoj pri spaca studado, pri la nekredebla kapablo de porkoj kaj optimismaj novaĵoj rilate la bonfarton de nia planedo: ĉesigo de senarbarigo. *Franciska Toubale*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



## SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:

1). Li diris dek-du fojojn ke la gramatiko baziĝu sur la logiko, kaj unu fojon ke ne.
2). Ili estas aŭ kaj eŭ.
3). Kaj, aŭ, escepte, krom.
4). Du, ĉar estas konjunkcio inter ili.
5). Ĉe la unua frazo ni ne loĝas en la urbo, sed en "Ni loĝas kampare" ni loĝas en la urbo sed en kampara maniero.

*Marcel Leereveld.*

"Tiu ĉi dento nur tre malfacile eltireblas" diris dentkuracisto al Makso. "Mi konsilas al vi, ke vi konsentu ke mi endormigu vin kvankam tio iomete plialtigas la prezon".

"Bone, eĉ bonege" diris Makso elpoŝigante sian monujon.

"Vi ne bezonas pagi jam hodiaŭ" diris la dentkuracisto.



"Tion mi bone scias" respondis Makso, "mi nur kalkulas mian monon antaŭ ol vi endormigos min!" *Bob Felby*